

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1985



29. GEFA-Jahresversammlung vom 4. – 6.10.85 in Lichtenfels



Der 2. Vorsitzende überreicht der Korbkönigin der Stadt Lichtenfels, Heike I.,
einen Strauß Blumen.

Digna jubilea jarkunveno de GEFA en Lichtenfels

Pli ol cent membroj kaj familianoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), inter ili gastoj el Belgio, Pollando kaj Svislando, kolektiĝis de la 4a ĝis la 6a de Oktobro 1985 por partpreni sian 29an postmilitan jarkunvenon kaj festi samtempe la 75jaran jubileon de la „Unuiĝo de germanaj fervojistaj esperantistoj“.

Akcepto

Dekomence neniu dubis, ke la elekto de Lichtenfels kiel kongresurbo per la kompetentuloj de la distrikto Nürnberg garantios sukcesplenan jarkunvenon. Antaŭ la zorgeme restaŭrita fasado de la stacidomo flirtis la Esperanto-flago en la blua ĉielo. Gentiliaj helpantoj eldonis en la stacidoma akceptejo rapide la kongres-paperojn kaj informis pri la proksimaj hoteloj kaj pensionoj. Speciala surprizo estis la kongresinsigno permane plektita kaj kompletigita per etikedo, kiun la presejo de la BULTENO senkoste estis liverinta.

Bonvenigo per la urbestro

En la mirinda, barokstila urbdomo s-ro Morgenroth, la tria urbestro, akceptis la kongresanojn. Honore al siaj gastoj li salutis ilin esperantlingve kaj regaligis per trinkaĵoj. La GEFA-prezidanto Giessner ricevis donace grandan foliujon kun presitaj desegnaĵoj kaj transdonis siaflanke la oficialan libron de la Germana Federacia Fervojo pri la 150jara jubileo.

Amikema interkona vespero

Kongresejo estis la alte situante restoracio „Bergschloß“ (montkastelo) kun konvena salonego. En unu el la apudaj ĉambroj s-ro Raab, fervojista radioamatoro, radiofone interkomunikigis dum tri tagoj kun multaj privataj sendstacioj en la mondo, al kiuj li raportis pri la aranĝoj de la GEFA-jarkunveno. En alia ĉambro la estraro traktis siajn problemojn kun la funkcioj de GEFA.

La salonego estis preskaŭ plena, kiam la kongresanoj babilante ĝuis tipe bavarajn manĝaĵojn, aŭskultis melodiojn de vigla muzikistaro kaj ĝojis pri la geknaba grupo „D'Werdenfelser“. Precipe plezurigis la spektantojn, kun kia vervo la geknaboj pretentis dancojn en kostumoj el la tempo de siaj praavoj.

Sabato kun abunda programo

Plej grava tago de tiu semajnfino estis la sabato. Bedaŭrinde la oferto plenumi la lingvan ekzamenon ne renkontis interesulojn tiun jaron. Tamen oni atendas

kandidatojn en la venonta tempo pro la kreskanta nombro de lernantoj de la telekurso, kiun GEFA eldonis kaj sukcesplene organizas.

Ankoraŭ regis preskaŭ somera vetero, kiam la kongresanoj kolektiĝis antaŭ la urbdomo por viziti kun sperta gvidanto la historian urbokernon. Oni admiris la Florian-fontanon sur la iama publika tribunallplaco, la paroŝan preĝejon „Nia kara Sinjorino“ el la 14a jarcento, la mezepokajn turojn, tra kiuj devas flui la forta aŭtomobiltrafiko. Ne mankis vizito al speciala butikoj de plektitaj varoj. Gustateme estis aperinta esperantlingva teksto al la oficiala prospekto pri Lichtenfels, kiun la Esperantogruppo „Luma ŝtonego“ en Lichtenfels estis eldoninta.

Nepublika laborkunsido

GEFA-prezidanto Giessner salutis la estraranojn, la komisiitojn por Esperanto de la direkciaj distriktoj kaj la komisiitojn por specialiaj taskoj; precipe li bonvenigis s-ron Rózkowski, la prezidanton de la polaj fervojistaj esperantistoj, kaj s-ron Czarnowski, la vicprezidanton de la fervoja direkcio Katowice. Dum certa tempo povis partopreni ankaŭ s-ro Rother, la reprezentanto de la ĉefestraro en la Fervoja Socialorganizaĵo (BSW). Temoj de la laborkunsido estis i.a. raporto pri la sukcesplena kunlaboro de GEFA okaze de la pasinta Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgsburg. Detaloj aperis en la oktobra eldono de la BULTENO. Ankaŭ stato kaj perspektivoj de la GEFA-telekurso okupis larĝan lokon. La partopreno al la IFEF-kongreso en 1986 starigis demandojn pri eventuala komuna vojaĝo al la kongresurbo Skopje/Jugoslavio. Traktataj estis ankaŭ la modifitaj rilatoj al la Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj al la Internacia Fervojista Esperanto-Federacia (IFEF).

La GEFA-prezidanto menciis la antaŭan intervjuon de la bavara radiostacio München kaj la gazetaran konferencon. La ĉi-lasta cetere kondukis al serio de plurkolonaj raportoj kun bildoj en tri gazetoj.

Kun aplaŭdo oni akceptis la inviton de la distrikto Essen okazigi la venontan jarkunvenon en Duisburg 17.–19.10.1986). La pensiuloj havos sian kunvenon la 6.9.1986. Detaloj sekvos. Fine la GEFA-prezidanto atentigis pri la ĵus aperinta speciala BULTENO, kiu entenas germanlingve la evoluon de la germanaj fervojistaj esperantistaj dum la lastaj 75 jaroj.

Tra la aŭtuna Frankonio

Post la komuna tagmanĝo en la kongresejo du plenplenaj aŭtobusoj startis al rondvojaĝo. La unua celo estis la vilaĝo Michelau, pli precize la tiea kurbmuzeo, la unusola tiuspeca en la mondo. Sperta gvidantino klarigis la parte antikvajn plektitajn objektojn el vimenaj veftovergoj, salikaj varpovergoj, kano, rotango, por menciĝi nur kelkajn materialojn: ŝi montris ankaŭ diversajn laborilojn por la plektado. En agrabla restoracio sur la proksima „Karolinen“-altaĵo atendis la kutima kafo kaj kuko, antaŭ ol la aŭtobusoj daŭrigis sian veturon al la grandioza monaĥejo Banz, nun posedaĵo de la bavara ŝtato. La barokstila dutura preĝejo invitis la vizito prezentante interne siajn altvalorajn objektojn el tiu konstruepoko. Tre utila estis la ampleksa esperantlingva informilo pri la eventoriĉa historio de la iama monaĥejo.

Sed allogis ankoraŭ alia vidindaĵo: la same barokstila baziliko „Dekkvar Sanktuloj“ situanta sur la alia flanko de la rivero Main. Bedaŭrinde eblis pro diservo nur mallonga vizito. Krome oni restaŭradas la internon de tiu vaste konata pilgrimejo. Ankaŭ pri tiu baziliko informis aparta informilo.

Brila festvespero

La vespero komenciĝis per bufedo abunda je tipaj frankoniaj manĝaĵoj. Malgraŭ forta apetito de la atakantaj kongresanoj fine ĝi ankoraŭ ne estis malplena. Gratulon al tiu ideo.

La salonegon plenigis preskaŭ 150 ĉeestantoj, kiam s-ro Röder, la komisiito por Esperanto en la distrikto Nürnberg, malfermis la festvesperon. GEFA-prezidanto Giessner povis saluti plurajn honorgastojn de la fervojo, fervoja socialorganizo, fervojista sindikato, urba magistrato kaj landa parlamento. Ili transdonis de siaj instancoj la sincerajn bondezirojn por la jarkunveno kaj por la progreso de Esperanto. S-ro d-ro Fischer, reprezentanto de la Germana Esperanto-Asocio laŭdis la

agadon de GEFA kaj apelaciis al kunlaboro por la venonta jubileo de Esperanto. S-ro Rózkowski invitis jam al la IFEF-kongreso 1987 en Katowice/Pollando. Salutojn de eksterlandaj gekolegoj transdonis s-ro de Sutter el Belgio kaj s-ino Fiechter el Svislando.

Specialan ĝuon por la spektantoj prezentis la virina dancgrupo de la gimnastika klubo TC Lichtenfels. Tiu vigla teamo ŝajnas multe dezirata, ĉar ili devis prezenti sin tuj aliloke. Nepe menciindas la alparolo de la ĉarma korbregino de Lichtenfels ĵus reveninta el alia urbo. Kvankam neesperantistino ŝi esprimis sin bonege en la internacia Lingvo. La fratinoj Maurer/Meeder ĝojigis per emociaj popolokantoj el Germanio kaj Rumanio.

Ne tro malfrue kiel jam dum antaŭaj jarkunvenoj la muzikistaro Höfer invitis al dancado. Volonte la paroj, la sinjorinoj parte en longaj roboj, frekventis la parkedon ĝis post noktmezo. Bone sukcesinta festverspero.



Akcepto fare de urbestro

Dimanĉa matineo

Ankoraŭfoje la salonego pleniĝis la matenon de la dimanĉo. S-ro Barnickel montris sian sonfilmon pri la lastjara IFEF-kongreso en Bulgario, kio reflektis multajn rememorojn inter la partoprenintoj. En sia jarraporto s-ro Giessner resumis la eventojn, agadojn kaj perspektivojn de la germanaj fervojistaj esperantistoj dum la pasinta jaro. Li apelaciis ne ĉesi en la poresperanta agado, precipe gajni postulojn inter la junularo. La geedzoj Wendt prezentis serion de mirindaj magiaĵoj, kiujn sekvis tondra aplaŭdo.

Per lumbildprelego s-ro Müller, unu el la aktivaj helpantoj de la jarkunveno, prezentis vidindaĵojn. Ne mankis deklamadon. Kun junecfreŝa voĉo s-ro Kiefer laŭtlegis fervojan travivajon, kiu estis gajninta premion en la lasta literatura konkurso. La matineo kompletigis komunaj kantoj, kiujn oni trovis en aparta „Korbeto plena da Esperantokantoj“.

Post la lasta komuna tagmanĝo sekvis la kutima adiaŭo ligita kun la promeso renkontiĝi denove en Oktobro 1986 dum la sekva jarkunveno de GEFA. Ĉiuj partoprenantoj esprimis sian ĝojon kaj dankon pri la jarkunveno, kiun precipe gesinjoroj Grass kaj Müller bonege kaj modele estis organizintaj.

W.B.

GEFA-Jahrestagung in der Korbstadt Lichtenfels

Zur 29. Jahresversammlung trafen sich vom 4. bis 6. Oktober 1985 über 100 Mitglieder und Freunde der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA)“ in der fränkischen Mainstadt Lichtenfels. Die in der Presse mehrmals positiv gewürdigte Veranstaltung stand gleichzeitig im Zeichen des 75jährigen Bestehens der Vereinigung. Rechtzeitig war eine Sonderausgabe des BULTENO erschienen, das über „Die deutschen Eisenbahner-Esperantisten im Wandel der Zeiten“ berichtet.

In zwei Arbeitssitzungen befaßten sich unter dem Vorsitz von Joachim Gießner Vorstand, Bezirks- und Sonderbeauftragte mit den vielfältigen Aufgaben innerhalb der Vereinigung sowie in den internationalen Esperanto-Gremien. Der von GEFA entwickelte Esperanto-Fernkurs hat ein erfreulich lebhaftes Echo gefunden. Die Übersetzungsarbeiten am Fachwörterbuch des Internationalen Eisenbahnverbandes werden der zu erwartenden Neuausgabe angepaßt und bedingen hierdurch einen späteren Abschluß. Die Grüße und Wünsche des Hauptvorstandes des Bundesbahn-Sozialwerks überbrachte Herr Rother, der gleichzeitig auf die besonderen Probleme hinwies, die sich auch auf die Tätigkeit der kulturellen Gruppen im BSW auswirken.

Den Teilnehmern wurde an diesem Wochenende ein reichhaltiges Programm geboten. Es begann mit einem Empfang durch den Bürgermeister im barocken Rathaus. Bei einem gemeinsamen Gang am darauffolgenden Samstagvormittag wurden die Sehenswürdigkeiten des mittelalterlichen Stadtkerns besichtigt. Die Esperantisten fielen überall durch ihr besonderes, geflochtenes Kongreßabzeichen auf. Im Tagungsort „Bergschloß“ gab es bei

fränkischen Speisen und den gelungenen Darbietungen einer jugendlichen Volkstanzgruppe ein frohes Wiedersehen unter den leider immer älter werdenden Teilnehmern.

Ein Busausflug führte zur weitläufigen Anlage des ehemaligen Klosters Banz sowie zur berühmten Wallfahrtskirche „Vierzehn Heiligen“, beide Perlen des fränkischen Barocks. Ein Besuch im einzigartigen Korbmuseum Michelau zeigte, wie wichtig die Flechtkunst in der Vergangenheit und der Gegenwart war und ist. Wie fast alljährlich war der Nachmittag von herblich-schönem, fast sommerlichem Wetter begünstigt.

Seinen Höhepunkt fand das Treffen im Festabend, dem ein opulentes Buffet vorausging. Ehrengäste aus dem In- und Ausland, letztere aus Belgien, Polen und der Schweiz, überbrachten den Versammelten Grüße und Wünsche ihrer Landesverbände. Besonderen Beifall erhielt die Korbstadtkönigin Heike die 1. für ihre Begrüßungsworte in Esperanto. Vertreter des BSW und der Gewerkschaften betonten die Gemeinsamkeiten der völkerverbindenden Tätigkeit. Die Gymnastikgruppe der Turnerschaft Lichtenfels bereicherte den Festabend mit ihren anmutigen Darbietungen. Anschließend schwangen die nimmermüden Anwesenden noch lange das Tanzbein. Ein gelungener, froher Abend.

Die Matineeveranstaltung am Sonntag brachte einen Tonfilm über den letztjährigen IFEF-Kongreß in Bulgarien, einen Diavortrag über das geschichtsträchtige Lichtenfels, wundervolle Zauberdarbietungen, Rezitationen, gemeinsames Singen von übersetzten Volksliedern und nicht zuletzt den Jahresbericht des GEFA-Vorsitzenden, der mit dem Aufruf zur aktiven Mitarbeit schloß. Der Vertreter des Deutschen Esperanto-Bundes (GEA) wies auf das 100jährige Jubiläum des Esperanto im Jahre 1987 hin.

Nach einem letzten gemeinsamen Mittagessen verabschiedeten sich die Teilnehmer. Dank einer guten Vorbereitung durch die Gruppe Lichtenfels und deren helfende Damen stand die Jubiläumsveranstaltung unter einem guten (grünen) Stern. Dank



Die Funkstation ist in Betrieb

Fotoj: Wegener

sagten viele auch den eifrigen Eisenbahner-Funkamateuren, die mit ihrer eigens errichteten Funkstation vielen Partnern in aller Welt von der Veranstaltung berichteten. Wir freuen uns schon jetzt auf das nächste Treffen im Oktober 1986. Wo? — In Duisburg.

W.B.

Jarraporto pri la periodo de la 28a ĝis la 29a jarkunveno (1984/85)

Enkonduko

Pasis la 75a jubilea jaro de GEFA (vidu Bultenon 4/85 kaj la specialan Bultenon aperintan en Oktobro 1985), kio signifas, ke nia asocio havas ekzakte la duonan aĝon de la germana fervojo. Ĉar pasis ankaŭ la jubilea jaro de la Germana Fervojo, la 150a. Sennombraj aranĝoj inundis la publikon en la tuta lando kaj komprenigis al la homoj, ke la fervojo estas kaj restos trafikilo plej moderna, sekura, kiun oni neniel povos malhavi. Tio estas bona. Kaj ni, la fervojistaj esperantistoj nur povas esperi, ke tiel la alfluo de junaj kolegoj, de „freŝa sango“, iam atingos ankaŭ nin.

Sed ni legu la realajn ciferojn:
La morto rikoltis nia membraro.

Oskar Höh	Julio 1984
Heinrich Meiners (71)	6.10.84
Josef Ballo (63)	2.12.84
Otto Denk (84)	12.12.84
Erwin Kudelka	Decembro 84
Albert Gier	Decembro 84
Alfred Wittland (77)	18.6.85

Ili postvivis en nia memoro.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

La de jaroj konstanta evoluo daŭris; tio signifas, ke la nombro de individuaj membroj denove malkreskis de 473 al 463. Kaj denove stariĝas la enigma demando, kiel tio povis okazi spite al proksimume 20 anoncitaj kursanoj, kiuj partoprenis kursojn ĝis la fino. En 1985 ni pagis al IFEF por 751 individuaj kaj korporativaj membroj. Por la IFEF-komitato ni sekve disponigas 4 komitatanojn.

1.2 Kursoj

El la distriktoj estis anoncitaj entute 10 kursoj kun 47 partoprenantoj. Kelkaj el tiuj kursoj estis aranĝitaj kune kun aliaj grupoj. Tamen restis defcito en la bilanco (vidu sub 1.1), kiu simple ne estas komprenebla kaj klarigebla. Pro tio ĉiuj distriktkomisiitoj kaj grupestroj sincere estas petataj, spiori la kaŭzojn de tiu malagrabra fenomeno kaj laŭeble plibonigi la situacion. Tio unuavice koncernas la ĉefpunkton: **Membrigi la kursanojn.**

Kontente ni povas konstati, ke la telekurso estas bone akceptita. Preskaŭ 150 ekzempleroj estas venditaj. Tamen ankoraŭ nenion oni povas diri pri la vera rezulto, ĉar nur parto el tiuj kursanoj fakte kaj daŭre kunlaboras. Denove ni ankaŭ atentigas je la konataj du lernolibroj „Esperanto — eine lebendige Sprache“ kaj „Konversacia Kurso“, kiuj daŭre estas haveblaj.

1.3 Kunlaborantoj

La laborokonsultaro (Arbeitsausschuß) Esperanto dufoje kunvenis kun la distriktoj kaj specialaj komisiitoj en Mönchengladbach (Oktobro) kaj Würzburg (Marto). Principe ne estis novaj ŝanĝoj inter la funkciuloj. Tamen menciindas, ke la librotendado de la financrimedo de la BSW-ĉefestraro kun efiko de 1.1.85 iris el la manoj de E. Kruse al la GEFA-sekretario H.J. Riehn.

2. Kunlaboro kun IFEF

49 germanoj partoprenis en la 37a IFEF-kongreso en Vejle (DK). Kiel komitatantoj nin tie reprezentis Grass, Herlitze, Ritterspach kaj Schindler. Elektita kiel gvidanto de la Terminara Komisiono kaj reelektita kiel sekretario de la Fakprelega Komisiono estis G. Ritterspach, konfirmita kiel redaktoro de „Terminara Kuriero“ H.D. Hartig. La preparadon kaj organizadon de la Literatura Konkurso en Vejle prizorgis E. Kruse. En la juraro kunlaboris niaj membroj W. Brandenburg kaj d-ro Brodt. Denove la faka karaktero de niaj kongresoj forte rimarkablis ne nur pro la elstara fakprelego, sed ankaŭ pere de plej interesaj kontribuajtoj el 10 landoj sub la titolo „Aktualaĵoj el diversaj landoj“, kompreneble ankaŭ DB-aktualaĵoj.

GEFA-prezidanto Giessner vizitis la hungaran jarkunvenon en Budapeŝto, kaj kun la IFEF-sekretario Rösemann la polan on Swidnica. Tie estis traktitaj problemoj de la 39a IFEF-kongreso. Giessner ankaŭ deklaris sin preta transpreni la organizajn laborojn por la venonta skisemajno en Sils (CH) kaj pro tio dufoje vojaĝis al Svisio.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 28a jarkunveno okazis de la 12a ĝis 14a de Oktobro 1984 en Mönchengladbach kun 102 partoprenantoj, el kiuj 19 eksterlandanoj el 6 landoj. Detala raporto en Bulteno 5/84. La unuan fojon en jarkunveno televida skipo filmis dum ĉiuj 3 tagoj kaj elsendis pozitive.

J. Giessner estis LKK-ano de la 70a UK en Augsburg. Pro tio li trifoje partoprenis en surlokaj kunsidoj kaj gvidis kvarkapan skipon en la kongreso mem (Böhnke, Hrazdil, Ullmann). Ili deĵoris tutan semajnon en speciala DB-ĝiĉeto. Dum la kongresa jaŭdo okazis la tradicia kontaktkunveno, en kiu ĉeestis pli ol 70 gekolegoj el 15 landoj. Partoprenis reprezentantoj de BSW-ĉefestraro (Rother) kaj de BSW-distriktestraro München. Post instrua dia-prolego de G. Ritterspach pri la 150a jubilea ekspozicio en Nürnberg la partoprenantoj komune veturis tien. Jen interesa superrigardo pri la laboro de la ĝiĉeta skipo:

Por DB estis venditaj 38 normalaj biletoj, 4 mini-grupoj, 71 rezerviloj por sidlokoj, 10 kuŝlokoj, 2 itinere-ŝanĝoj, 1 bil. por

biciklo, 19 IC-suplementoj, 28 specialaj revenbiletoj ontute por 4502,20 DM. Krome estis donitaj pli ol mil horar-informoj kaj centoj da aliaj informoj. Dum la unuaj du tagoj estis venditaj helpe por LKK ĉirkaŭ 800 abonbiletoj por la enurbaj trafikiloj por pli ol 14 000 DM.

Multaj el niaj membroj partoprenis, kiel ĉiujare, en jarkunvenoj de aliaj landoj kaj en la 26a Internacia Skisemajno en Morzine (F). La kontaktoj al BSW-ĉefestraro kaj en preskaŭ ĉiuj distriktoj estis tre bonaj. Necesa helpo ĉiam donita.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

„BULTENO“ aperis kvinfoje (5/84 ĝis 4/85), la lasta kiel cdonajo de GEFA, kun 42 paĝoj, en ili 11 fotoj. Kiel jam de pli ol 30 jaroj la bulteno montriĝis kiel necesa kaj ŝatata ligilo inter membraro kaj estraro same kiel ĝi informis multajn interesiajn instituciojn (ekz. ĉe DB, BSW, bibliotekoj ktp) kaj Esperanto-organizaĵojn pri nia agado.

Okaze de la 75a jubileo de GEFA aperis speciala numero de „BULTENO“ kun 24 paĝoj, sur kiuj estas priskribitaj la plej gravaj eventoj de la GEFA-historio.

4.2 Gazetaro

En la oficiala informilo de DB ni konstatis 3, en direkciaj 17 publikigaĵojn, krome multajn en la distriktaj „BSW-Mitteilungen“. Pri 75 artikoloj ni eksciis en la taga gazetaro. Dufoje raportis regiona radio, dufoje televido pri nia agado. Okazis 6 ekspozicioj.

4.3 Varbado

Estis distribuitaj pli ol 5000 varbiloj 500 broŝuretoj kaj elpendigitaj 400 afiŝoj. Tamen la rezulto ne estas konforma al la donitaj energio kaj rimedoj. Denove ni petas bonvoleman kapablan kolegon, transpreni la taskon de respondeculo por tiu gravega laborkampo „Informado / varbado“.

4.4 Prospektoj, rekamoj

Kelkaj el niaj membroj forto kaj senlace kunlaboris en starigo aŭ tradukado de diversaj prospektoj aŭ informiloj, ekz. de la urboj Duisburg, Lichtenfels (okaze de la jarkunveno), de la ekspozicio 150 jarojn Germana Fervojo, pri vojaĝeblecoj per la DB en la 2a oficiala Bulteno de la 70 UK kaj poste en la 70 UK mem. En la

jarlibro de UEA jam de 5 jaroj aperis
tutpaĝaj anoncoj de la vojaĝentrepreno
„Transalpino“ kaj en 1984 kaj 85 tiaj de. DB

5. Emerituloj

La renkontiĝo de la emerituloj okazis la
7an de Septembro en Frankfurt (Main).
Partoprenis 42 personoj, kiuj kiel kutime
travisis agrablajn horojn en amikeca rondo
de malnovaj konatoj

Perspektivo

Dankon unue, tutkoran dankon al ĉiuj
amikoj, kiuj ĉiam denove, pluraj jam de
jardekoj, zorgas, ke GEFA vivis kaj vivas
kaj ĝuas bonan renomon. Ili ne kulpas,
ke la situacio estas malbona, sed ne
senesperiga. Tiu iom banala, ofte uzita
onidiro certe trafas la kapon de la najlo.
Mi ŝatas jen ripeti 2 frazojn el la
finvortoj en la sub 4.1 menciita speciala
Bulteno: „Ankoraŭ ni devos ĉie kaj ĉiam
fronti kontraŭstarojn, lukti kontraŭ
antaŭjuĝoj kaj nin armi per pacienco.
Sed neniam ni rajtos laciĝi, same kiel la
kreinto de tiu lingvomiraklo ĝis sia morto
neniam laciĝis.“

Jen nia perspektivo! Ni agu laŭ ĝi, kaj kun
certeco niaj nepoj povos celebri la
centan jubileon de la Asocio en la
jaro 2010 – se ne la respondecaj gvidantoj
de la mondo antaŭe zorgos por ties
detruo. La mond vasta porpaca agado de
la esperantistaro kunhelpu eviti tion.

kompilis J. Giessner

Matinea parolado

de GEFA-prezidanto Giessner

Eble mi komencu koncize raporti pri
la granda evento de tiu somero,
la 70a UK Augsburg, kiu esence staris
sub la devizo „paco“. Tio estis i. a.
akcentita pro tio, ke la kongresan
ĵaŭdon okazis pacofesto en Augsburg,
ke ĝuste en tiu semajno venis la
40a memortago pri la bombo en
Hiroshima, ke bavaraĝ gelearnantoj
ludis apartan pacoludon. La kongreso
kun pli ol 2300 partoprenantoj estis
inter la plej signifaj en okcidentaj
landoj. La fervojistoj havis kontakt-
kunvenon, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 70
personoj el 15 landoj, i. a. s-ro Rother
de la BSW-ĉefestraro kaj reprezentan-
toj de la BSW-distriktestro kaj de la
distrikta personara reprezentantaro Mün-

chen. Post tre instrua dia-prelego de Ger-
not Ritterspach ĉiuj komune veturis al
Nürnberg kaj vizitis la tian jubilean
ekspozicion.

Laŭ iniciato de GEFA la Germana
Federacia Fervojo estis instalinta apartan
giĉeton en la kongresejo, cetera la plej
belan kaj efikan el ĉiuj kongresaj giĉetoj.
Kvar el niaj membroj – kol. Böhnke,
Hrazdil, Ullmann kaj mi – tie deĵoris
dum la tuta semajno. Ni vendis ĉirkaŭ
800 abonbiletojn por la urbaj trafikiloj
dum la unuaj du tagoj kaj enspezis 4500
GM por la DB. Sed la plej grava estis pli ol
milo da informoj pri horaroj, biletoj,
itineraj kaj centoj da respondoj je aliaj
ĝeneralaj demandoj. Multaj personoj
fine venis por danki pro la helpo.

Hodiaŭ ni havas nian 29an jarkunvenon,
unu pli en la seninterrompa ĉeno de
post 1957, kiam la unua okazis en Fulda.
Kelkaj el vi tiam ĉeestis, sed multaj
ankoraŭ ne estis membroj de nia asocio.
Por ni ĉiuj kvazaŭ fariĝis memkomprenebla,
ke ĉiun jaron ni kunvenas, por trakti
niajn problemojn, por flegi personajn
kontaktojn kaj amikecon, por komune festi.
Sed ĉio tio ne estas memkomprenebla,
kiam oni retrorogardas al la jaroj antaŭ
la unua jarkunveno aŭ eĉ ĝis la naskiĝjaro
de nia asocio, kiu nun vivas 75 jarojn.
La duan de Oktobro 1910, do ekzakte antaŭ
75 jaroj, estis fondita en Elberfeld la Ligo
de germanaj fervojaj esperantistoj
(Vereinigung dt. Eisenbahner-Esperantisten).
Por ni nuntempuloj ne estas imagebla,
kion tio signifis, kia kuraĝo kaj entuziasmo
necesis, por krei el nenio tian asocion, por
kiu ja neniu bazo, neniu modelo ekzistis.
En la tuta regiono de la tiama Germana
Regno dise vivis unuopaj fervojistoj
esperantistaj, de Oldenburg ĝis la
regiono de Basel, de Kaiserslautern ĝis
tiam germanaj Kattowitz kaj Bromberg.
Entrepreneur kolego Otto Glade en
Küllenhahn apud Elberfeld sukcesis ne nur
fandi la asocion, sed ankaŭ interesigi
plurajn germanajn fervojajn kompaniojn,
tiel ke en multaj lokoj kun parte oficiala
subteno povis okazi lingvo-kursoj. Kelkajn
jarojn poste, en 1914, oni jam planis
partopreni en faka kunveno de la fervojistoj
en la UK Parizo, kiun intencan malebligis
la eksplodo de la unua mondmilito.

Aktivaj kolegoj, kiuj tiam gvidis la
germanan asocion, post tiu milito daŭrigis

la laboron kaj sukcesis ne nur refondi la asocion, sed savis ĝin tra la postmilitaj jaroj de plej terura inflacio, politikaj pasioj personara maldungado, kreskanta senlaboreco, ĝis kiam la ĉion-egaliga politiko de Tria Regno devigis ĉesi ĉian ajn aktivecon por tiu malŝatata de ili internacia lingvo.

Eble decas jen memori je la nomoj Georg Habelok el Breslau, kiu dum jaroj gvidis la asocion, Ernst Muthschall el Halle, Alfred Petzold el Leipzig, ĉiuj long-jaraj estraranoj, Petzold eĉ jam antaŭ la milito estis en la internacia estraro. Laste ni ne forgesu la nomon de Reichsbahn-Amtmann Karl Hell (München), kiu post la dua mondmilito dum la unuaj jaroj konsiderinde zorgis por revivigo de la asocio, tiel ke en la Germana Esperanto-Kongreso 1948 en München 19 fervojistoj el 7 direktoj kunvenis, kaj la tiama ORR Schuchmann jam povis transdoni salutojn de plej altaj instancoj. En 1949 la germanaj fervojistoj esperantistaj estis akceptitaj kiel kultura grupo en BSW, kaj en 1950 la unuan fojon povis partopreni 16 germanaj fervojistoj en la 2a IFEF-kongreso.

Ne povas esti celo de miaj nunaj vortoj detale trakti la historion de GEFA. Ĝi estas tiel multkolora, riĉa je eventoj, ke oni povus skribi libron pri ĝi. Jam dufoje estis eldonitaj specialaj Bultenoj en 1961 kaj 1980, kiuj sufiĉe klare priskribis la pli gravajn okazintaĵojn. Tamen multaj el la nunaj membroj ne disponas pri ambaŭ. Pro tio ni eldonis okaze de la hodiaŭa jubileo denove specialan numeron de „Bulteno“, kiu ripetas grandan parton el la enhavo de la du antaŭaj kaj estas kompletigita ĝis nun. Kelkajn ekzemplerojn ni disdonis tie ĉi, sed ĉiu individua membro ricevos ĝin aŭtomate.

Tiu GEFA-historieto klare montras, kiel forte dependis la ekzistado de nia asocio de la sindonemo de ne tro granda nombro da kolegoj en tuta Germanio, homoj, kiuj ne longe demandis, sed agadis. Homoj, kiuj komprenis la mesaĝon de d-ro Zamenhof, kiu ankaŭ spite al plej teruraj obstakloj kaj obstinaĵoj de kontraŭuloj simple agadis. Se li ne estus farinta tion, ni ne estus en tiu salono. Li estas nia modelo, la kolegoj antaŭ ni estas niaj modeloj. Ankaŭ ni ne longe demandu. Jam ofte la afero de Esperanto estis minacita de danĝeroj

diversspecaj. Danĝeroj ekzistas, por ke oni venku ilin. La danĝeroj por nia asocio estas konataj kaj ofte ripetitaj. Ankaŭ ili ekzistas, por ke ni venku ilin, sen demandi. Ni nuntempuloj respondecas por la estonteco de nia lingvo kaj de nia faka organizo. Niaj antaŭuloj majstris multe pli malfacilajn situaciojn ol estas la nia. Ili ne hontigu nin, sed ni imitu ilin, Bonvolu ĉiuj legi la specialan Bultenon, kiam ĝi venos en viajn manojn. Kaj ne nur legu, sed prenu ĝin kiel instigilon. Ĉiuj anoj de la asocio havas eblecojn, progresigi la lingvon. Tiu Bulteno abunde montras ekzemplojn kaj eblecojn. Se ĉiuj kunhelpos, niaj posteuloj povos festi post kvarona jarcento la centan jubileon. Tion ni certe ĉiuj deziras. Ni esperu, ke la deziro realiĝu.

En monato Februaro mortis nia mult-jara membro kaj kara amikino

Martha Erhard.

Ŝi estis dum multaj jaroj tre aktiva kaj ĉiam helpema en nia rondo. Kune kun sia edzo ŝi partoprenis multajn kongresojn de IFEF. UEA kaj GEA kaj subtenis Esperanton grandanime. Ŝi havis vastan korespondadon al tuta mondo kaj vizitis multajn forajn landojn pere de Esperanto. En Februaro ŝi iris al la lasta vojaĝo. Ŝi ripozu en paco.

Fervojista Esperanto grupo Munkeno kaj GEFA

Mitteilungen

An der 29. JV in Lichtenfels beteiligten sich 109 Teilnehmer. Der Festabend war mit 143 Besuchern ein voller Erfolg.

Die 30. JV findet vom 17.–19.10.1986 in Duisburg (Bez. Essen) statt.

Für die 31. JV im Oktober 1987 hat der Bezirk München nach Ingolstadt eingeladen.

Frühjahrstreffen des AA mit den Bba und Sd-Beauftragten am Sa. 15. 3. 1986 in Fulda.

Das Seniorentreffen 1986 wird voraussichtlich am 6.9. stattfinden. Der Ort wird rechtzeitig bekanntgegeben.

Bundesverdienstkreuz für Hedwig Schnetzer

Die Gattin unseres Mitglieds Alfred Schnetzer, des früheren langjährigen Bezirksbeauftragten von Essen, Frau Hedwig Schnetzer, erhielt am 24. 8. 1985 das Verdienstkreuz am Bande des Verdienstordens der Bundesrepublik Deutschland aus der Hand der Oberbürgermeisterin der Stadt Hamm (Westf). Sie hat seit dem Tode ihrer Eltern im Jahre 1953, also seit über 30 Jahren, ihre seit Geburt spastisch gelähmte Schwester, die vollständig auf fremde Hilfe angewiesen ist, in ihren Haushalt aufgenommen und gepflegt. Sie tut dies noch immer, obwohl sie selbst fast blind ist und ihr Ehemann ebenfalls dauernder Fürsorge und Hilfe bedarf, eine unglaubliche menschliche und soziale Leistung.

Wir gratulieren Frau Schnetzer sehr herzlich zu dieser mehr als verdienten Auszeichnung und wünschen ihr auch weiterhin die notwendige Kraft zur Erfüllung ihrer schweren Aufgabe.

Gießner

15. Seniorentreffen am 7. 9. 1985 in Frankfurt

Selbst der Himmel hatte seine Freude an diesem Treffen! Er schenkte den 42 Senioren, die aus allen Teilen der Bundesrepublik angereist waren, einen herrlichen, sonnigen Tag. Was Wunder, daß ich an diesem 7. September im Pavillon der Hauptbahnhofsgaststätten im Namen des BSW-HV eine frohe Gesellschaft willkommen heißen konnte.

Das war ein lebhaftes Begrüßen zwischen alten Bekannten, von denen sich einige seit mehreren Jahren nicht mehr gesehen hatten. Viele gemeinsame Erinnerungen wurden ausgetauscht. Die bei Esperanto-Veranstaltungen und internationalen Kongressen gemachten Erfahrungen wurden diskutiert. Wie immer konnte ich auch in diesem Jahr neue „Senioren“ begrüßen und schriftliche Grüße übermitteln von denen, die nicht dabei sein konnten. Daß Herr Gießner wegen Teilnahme an einer IFEF-Vorstandssitzung verhindert war, wurde allgemein bedauert.

Leider fiel auch ein Wermutstropfen in die Runde, als man erfuhr, welche Sprachfreunde uns im letzten Jahr für immer verlassen haben. Wie schön, daß sich deren Ehefrauen weiterhin mit Esperanto

verbunden fühlen und dies durch ihre Anwesenheit unter Beweis stellten. Sie wurden ganz besonders begrüßt und ermuntert, sich auch künftig nicht auszuschließen, sondern die bestehenden Kontakte weiter zu pflegen.

Wieder hatten sich einige Talentierte auf diesen Tag vorbereitet. Da wurde Originales und Übersetztes vorgetragen. Der Humor kam nicht zu kurz.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen unternahmen wir einen Spaziergang zum „Römer“. Niemand schloß sich aus. Auch die 86/87 Jährigen marschierten eifrig mit. Leider hatte ich nicht bedacht, daß die Stadt Frankfurt an diesem Wochenende den „Tag der offenen Tür“ veranstaltet hatte und infolge dessen der Römerberg von Besuchern und Schaulustigen nur so wimmelte. Erklärungen mußten wegfallen, aber der neubebaute Römerberg mit seinen originalgetreuen Häusern konnte doch bewundert werden.

Um 15.00 Uhr fanden sich alle zur Kaffeekunde wieder ein. Die Zeit verging viel zu schnell. Obwohl noch kein fester Ort für das nächste Treffen vereinbart werden konnte, war man sich einig, daß es auch im nächsten Jahr Anfang September wiederholt werden sollte. Ich wurde gebeten, einen für möglichst viele Teilnehmer erreichbaren Ort mit günstigen Bedingungen auszusuchen. Sichtlich angeregt, zufrieden und dankbar verabschiedeten sich alle und fuhren in verschiedene Richtungen wieder heim.

Dank dem BSW-HV, der es immer wieder ermöglicht, diese Treffen angenehm zu gestalten.

Elfriede Kruse

Fernlehrgang:

148 Teilnehmer nehmen z.Zt. (Stand: 1. 10. 1983) am Fernlehrgang teil, siehe Veröffentlichung im Bulteno 3/85, Seite 11. Werben Sie neue Interessenten für diese ausgezeichnete Lernmöglichkeit! Die 1. Ausgabe ist z.Zt. vergriffen, die 2. Ausgabe erscheint in diesen Tagen.

Redaktino por n-ro 1/86 estas la 15.1.86

Neueste Informationen zum 38. IFEF-Kongreß in Skopje

1. Anreise

Eine besondere Reisegruppe mit Flugzeug wird nicht organisiert. Wer fliegen will, sollte den Weg über Belgrad nehmen, von wo mehrfach täglich Flugverbindung nach Skopje besteht.

Es wird versucht, zusätzliche Liegewagen in folgenden Zügen einzusetzen:

a) am Donnerstag, 15. 5. 1986 im D 411, Hellas-Expreß, Stuttgart ab 18.25, München ab 21.38, Skopje an Freitag, 16. 5., 22.02, b) am Freitag, 16. 5. mit D 291 Akropolis, München ab 8.16, Skopje an Sonnabend 17. 5. 8.33 Uhr.

Wer diese Wagen benutzen will, buche dies möglichst bald, spätestens bis 31. 3. bei einem Schalter der DB oder Reisebüro **mit dem Zusatz „für Gruppenreise“**. Außerdem wird gebeten, **gleichzeitig** eine Mitteilung über diese Bestellung an den **IFEF-Sekretär** Otto Rösemann, Ringstraße 140, 3067 Lindhorst oder als EDS an BAmtn Rösemann – Bf 52 – BD 300 Hannover bis ebenfalls spätestens 31. 3. 1986 zu senden. Mit dieser Mitteilung können Sie auch angeben, falls Sie **direkt** nach Deutschland zurückfahren wollen, ob Sie den D 410, Hellas Expreß, Skopje ab 24. 5. um 9.30, München an 25. 5. 10.10 Uhr benutzen wollen.

Über die genaue Geltungsdauer der Kongreßkarte als Freifahrtausweis auf den jugoslawischen Strecken folgt Mitteilung, sobald die Daten festliegen.

2. Unterkunft Die im Aliĝilo und „Internacia Fervojisto“ 5/85 bekanntgegebenen Preise konnten herabgesetzt werden. Sie betragen nunmehr pro Person in US-Dollar für Übernachtung und Frühstück in

Hotel Kat. A	Bad/Dusche/WC		
	Zweibettz.	21	Einbettz. 24
Hotel Kat. B	Bad oder Dusche/WC		
	Zweibettz.	14	Einbettz. 18
Hotel Kat. C	Dusche/WC		
	Zweibettz.	13	Einbettz. 17

Die Zimmer werden in Dinar nach dem Tageskurs bezahlt. Nach Jugoslawien dürfen nur 2500 Dinar eingeführt werden (Stand Nov. 85). Der Umtauschkurs in Jugoslawien ist wesentlich günstiger. Die Preise für Mahlzeiten und Getränke sind bescheiden.

3. Ausflug Der erste Ausflug (Besichtigung der Stadt und Umgebung) ist kostenlos.

4. Anmeldung Bitte melden Sie sich bald an, dann haben Sie Aussicht, in einem günstig gelegenen Hotel untergebracht zu werden.

Bitte beachten Sie die ausführlicheren Informationen in IF 6/85!

GEFA

Aus den Bezirken und Gruppen

Hannover / Bremen:

Zu einem gemeinsamen Essen trafen sich die Gruppenmitglieder am 20. 9. beim gastgebenden Ehepaar Coburger. Die Diskussionsabende fanden am 27. 11. und 4. 12. statt. Die Zamenhoffeier soll am 11. 12. wie gewohnt veranstaltet werden.

Essen / Dortmund:

Im Rheinisch-Westfälischen Institut für Weiterbildung hat unser Mitglied Günther Bartz am 14. 10. einen Diavortrag „Als Esperantist in Süddänemark“ (Anm.: Es handelt sich um Eindrücke und Erinnerungen vom 37. IFEF-Kongreß) gehalten.

Lichtenfels:

Rechtzeitig zur JV wurde ein Stadtprospekt mit Esperanto-Einlage aufgelegt. Interessenten wenden sich bitte an Städt. Verkehrsamt, Postfach 1220, 8620 Lichtenfels.

Al niaj membroj kaj eksterlandaj gemikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck / presio: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz